

ILEI-KONFERENCO — AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

La 42-a ILEI konferenco
La 17-25an de julio, 2009
KRAKOVO, POLLANDO

- Kolegeca etoso en intima rondo
- Ebleco plibonigi viajn instrukapablojn
- Simpozio laŭ konferenca temo
- La Nokto de la Lingvoj en ĉefplaco en urbocentro
- Variaj kaj instigaj prelegoj
- Konatiĝo kun la mondo de edukado
- Pluraj jam tradiciaj kaj novaj programeroj
- Agrablaj vesperoj kaj ekskursoj
- Moderkosta loĝado kaj varia programo
- Planata surprizo survoje al UK
- Kaj multe pli



NIAJ PROTEKTANTOJ, PATRONOJ, PARTNEROJ, SUBTENANTOJ, KUNORGANIZANTOJ KAJ SPONSOROJ



La alta protektanto de la konferenco — MAREK NAWARA, marŝalo de provinco Małopolska

Patrono de la konferenco — MICHAŁ ŚLIWA, rektoro de Pedagogia Universitato en Krakovo



Patrono de la konferenco — ZBIGNIEW KRUSZEWSKI, rektoro de La Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Płock

Honora patrono de la konferenco — WŁODZIMIERZ ROSZCZYŃSKI, rektoro de La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB) en Krakovo

Partnero — Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz en Poznań



Partnero — La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB) en Krakovo

Kunorganizanto — La Supera Lernejo Paweł Włodkowic en Płock

Kunorganizanto — pola sekcio de ILEI



Województwo
Małopolskie



La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado

La kongresa temo de UEA kaj la konferenca temo de ILEI por la jaro 2009 indikas multe da komuna enhavo kaj samcela orientiĝo kvankam ili havas en siaj titoloj eĉ ne unu saman vorton krom *la*. La UK-tema slogano *Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ* sintezas en si aktualajn programajn akcentojn de Unesko kaj UN kun la idea esenco kaj praktika valoro de la verko de Zamenhof, omaĝe al lia 150-a naskiĝdatreveno.

Dume ILEI koncentras sian atenton al la pedagogiaj aspektoj de la sama temkomplekso omaĝe al sia 60-jariĝo, al la 60-jariĝo de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* kaj al la *Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009*. La ILEI-konferenca temo *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado* celas enfokusigi du komplementajn taskojn: edukadon al Esperanto kaj edukadon per Esperanto. Tio signifas pluvivigon de la Esperanto-komunumo per formado de novaj esperantistoj kaj edukadon al la kulturo de paco kaj senperforta solvado de konfliktoj. Tio signifas flegadon de la sentempaj Zamenhofaj idealoj kaj kreadon de fundamentaj ŝtonoj por la paca ponto inter la popoloj.

Programo:

Por la konferenco ni planas: interkonan (manĝ)vesperon, Inaŭguron, La Nokton de la Lingvoj kaj Kulturoj, unutagan Simpozion laŭ la konferenca temo, komitatkunsidojn, estrarkunsidojn, ILEI/UEA ekzamenojn, proponitajn prelegojn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, seminariojn pri E-literaturo, de E@I kaj lernu!-sesion pri Interkulturo, renkontiĝon de universitataj instruistoj, rapidkurson de la pola lingvo, prelegserion „Ekkonu konferencan landon“, metiejon por poeziemuloj, bunatan kaj varian vesperan (kulturan kaj distran) programon kaj aparte pagendan bankedon — komunan vespermanĝon en lukseca etoso, ravajn ekskursojn.

Pli da informoj pri la programo:

La 17an: posttagmeze alveno, registriĝo, loĝiĝo; vespere vespermanĝo, Interkona (manĝ)vespero kun diverslandaj manĝoj, alportitaj de la konferencanoj. Ni mallonge prezentos nin mem, niajn landojn kaj alportitajn frandaĵojn dum maksimume 1 minuto, distra programo.

La 18an: matene Solena Inaŭguro, ĉefprelego; posttagmeze ILEI/UEA ekzamenoj, ĝenerala konferenca laboro; vespere, Nacia Vespero kaj distra programo.

La 19an: matene ekskurso DT1 piede tra Krakovo, ILEI/UEA ekzamenoj, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala konferenca laboro; vespere koncerto de „Kamea“ kaj distra programo.

La 20an: matene ILEI/UEA ekzamenoj, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ekskurso DT2 al Wieliczka, ILEI/UEA ekzamenoj, ĝenerala konferenca laboro; vespere Aligatorejo kaj distra programo.

La 21an: matene TT1 al Zakopane, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala konferenca laboro; vespere Teatra vespero kaj distra programo.

La 22an: matene renkontiĝo de universitataj instruistoj, komitatkunsido, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ekskurso DT3 al Niepołomice, renkontiĝo de universitataj instruistoj, komitatkunsido, ĝenerala konferenca laboro; vespere Bankedo en ĉarma restoracio en urbocentro kaj Konferenca Balo.

La 23an: dum tuta tago ekskurso TT2 al Wadowice, Kalwaria, Oświęcim, Scienca Simpozio laŭ konferenca temo; vespere Internacia Arta Vespero al kiu kontribuos, laŭdezire, la partoprenantoj kaj distra programo.

La 24an: matene renkontiĝo de universitataj instruistoj, estrarkunsido, ĝenerala konferenca laboro; posttagmeze ĝenerala esembleo, Solena Fermo; vespere La Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj en kulturdomo en urbocentro, eventuale koncerto de JoMo kaj distra programo.

La 25an: matene matenmanĝo, forveturo al UK per rekta trajno (survoje antaŭvidata surprizo por ne enui).

Tagordo: ke Vi povu pli bone orientiĝi en la programo, jen neŝanĝeblaj programeroj — matenmanĝo je la 8:00-9:00 tagmanĝo je la 13:00-14:00 vespermanĝo je la 18:00-19:00.

Detala programo aperos en retpaĝo de ILEI (www.ilei.info) kaj Konferenca Libro kun resumoj de prelegoj por la Simpozio kaj ĝenerala programo. Ĝi enhavos ankaŭ priskribojn de aliaj programeroj.

Detala horaro de la programo:

http://www.ilei.info/konferenco/2009/Horaro_Krakovo.pdf

Pli detale pri la Simpozio:

La unuan fojon konferenca simpozio kunlabore kun loka universitata medio okazis en la jaro 2005 en Kaunas dum la 38-a ILEI-konferenco. La konferencon kaj simpozion apogis Kaunas Humanisma Fakultato de Vilnius Universitato. Kompreneble, ĝi estis nur eksperimento. Sed, laŭdire, tre sukcesa. Neesperantistaj universitatanoj jam kelkfoje demandis, kiam denove ili povos partopreni esperantistan konferencon. Por ni — esperantistaj instruistoj — tre gravas, ke ni havu eblecon interŝanĝi ideojn ankaŭ kun ekstermovadaj pedagogoj. Plej grava atingo estas subskribitaj interuniversitataj kontraktoj. Tiamaniere, pere de Esperanto kreiĝis profesiaj kontaktoj kun nemovadaj kolegoj. Pro tio la simpozio okazis ankaŭ en la jaro 2006 en Parma dum la 39-a ILEI-konferenco. Denove ĝi estis tre sukcesa — lokaj organizantoj sukcesis allogi ankaŭ atenton de lokaj gravuloj, urba municipo, komunumo. La 40-a ILEI-konferenco okazis en alia mondoparto, en Japanio, en urbo Ranzan en 2007. Ankaŭ tie okazis unutaga simpozio laŭ konferenca temo. Ĝin partoprenis kelkaj gastoj, venintaj speciale por la Simpozio kaj salutparoladon faris vicdirektorino de la konferencejo Ŝtata Eduk-Centro por Virinoj. En 2008 ni konferencis en Afriko kaj denove okazis Simpozio. La Simpozio daŭris nur duontagon, ni havis prelegantojn el Eŭropo, Japanio kaj — tre gravas — Afriko.

Ĉijare ni konferencas en Eŭropo, Pollando, Krakovo, kie ni havas plurajn prelegantojn — eminentajn polajn profesorojn kaj famajn esperantistojn sciencistojn.

Esperantistoj estas tre amikema, tolerema kaj kreiva „popolo“. Ebleco komuniki kun loka medio ĉiam estas trajto de esperantistaj aranĝoj. Pro tio aperis la ideo elprovi la simpozion ankaŭ en tiu medio. Ĉu ni sukcesos? Ni kredas, ke jes, sed Vi ĉiuj estas bonvenaj ĉeesti kaj testi (dezirinde poste vaste kaj publike klaĉi) kaj nepre serĉi personajn kontaktojn por daŭra kunlaboro. Oni povas prelegi en la lingvoj Esperanto kaj la pola (kun traduko al Esperanto). Se oni volas prelegi en aliaj lingvoj, oni devas mem prizorgi pri traduko al Esperanto. Oni nepre havu resumon en Esperanto, sendepende de la lingvo en kiu oni prelegos! Por aliĝi al la Simpozio necesas plenigi aliĝilon kaj sendi resumon de la prelego al estrarano pri konferencoj Aida Ĉiĝikaitė.

Se vi volas riĉigi per prelego la programon de la Simpozio aŭ havas konaton kiu dezirus aŭ povus tion fari, bonvolu turni vin al organizantoj.

La organiza komitato sendos al la aliĝintoj informojn pri la partopreno. Simpozia programo kaj retumoj de referaĵoj aperos en retpaĝo de ILEI kaj Konferenca Libro.

Detala programo de la simpozio:

http://www.ilei.info/konferenco/2009/Simpozio_programo.pdf

Pli pri Lingva Festivalo

Lingvo estas la rimedo per kiu oni ekkonas mondon kaj respeguligas siajn pensojn al la aliaj. Plej verŝajne ne ekzistas pli interesa kaj pli mistera mondo, ol mondo de lingvoj. Ni ĉiuj jam rimarkis, ke la samajn aferojn oni vortigas diversmaniere, depende de la lingvo. Tamen, estas bezonata ankaŭ ponto inter multaj esprimeblecoj.

Almenaŭ dum lingvaj festivaloj, kiuj okazas en diversaj e-aranĝoj, taskon de tiu ponto plenumas Esperanto. Tre bone, se ni havas eblecon aranĝi lingvan festivalon kvazaŭ donacon de esperantistoj al la loka publiko. Tiukaze la lokaj loĝantoj ne nur ĝuas la buntecon de la lingva mondo, sed ankaŭ vidas la valoron de la Zamenhofa lingvo.

Tre interesaj estas lingvaj festivaloj, kiuj daŭras dum kelkaj tagoj, ekzemple *Ĉielarko* en Ĉeboksari en Ruslando, kaj la originala lingva festivalo de Tours, Francio, nomata *LinguaFest*. Tamen valoras la penon dediĉi ankaŭ duontagon aŭ vesperon dum iu alia e-aranĝo, se ni havas spektantojn. ILEI jam dum kelkaj konferencoj klopodis havi la festivalon kaj ĉiam ili estis sukcesaj. Kompreneble, ili estas ĉiam malsamaj, depende de la lokaj kondiĉoj.

Ankaŭ dum la 42-a ILEI konferenco en Krakivo, Pollando okazos Festivalo de Lingvoj. Laŭ programo ĝi estas antaŭvidata la 23an de julio, post vespermanĝo, en la tago de la Simpozio, kiam ni havos gastojn — eminentajn polajn profesorojn, rektorojn, espereble ankaŭ ĵurnalistojn.

Kio estas la festivalo? La LF estas donaco de esperantistoj instruistoj kaj aliaj partoprenantoj de la 42-a ILEI-konferenco al urbanoj kaj tio estas iuspeca kunlaboro de ILEI kun urba komunumo. Tiamaniere ILEI volas danki lokajn gravulojn pro la apogo de la konferenco. Ĝuste pro tio LF estos anticipa anoncita, senpaga, libere vizitebla aranĝo deducita al lokanoj.

Kie okazos la festivalo? En Krakovo, Pollando, konferencejo de la 42a ILEI-konferenco La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB) en Krakovo, ĉe la strato Armii Krajowej 8 (www.wszib.edu.pl).

Kiu partoprenos en la festivalo? Unuflanke diverslandaj esperantistoj, partoprenantoj de la 42-a ILEI-konferenco prezentos siajn lingvojn. Aliflanke: lokaj loĝantoj, kiuj povus ĝui prezentojn kaj konatiĝi kun diversaj lingvoj kaj plivastigi siajn interkulturajn konojn.

Kiel funkcios la festivalo? La LF similos al foiro de intereso, kie prezenti sian landon kaj sian lingvon, estos invitataj ĉiuj partoprenantoj de la 42-a ILEI-konferenco. Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, eblas uzi lumbildojn, komputilan projekciilon, veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi nacian muzikon, naciajn dancojn kaj multon, multon pli.

Kiel aliĝi al la festivalo? La LF estas organizota de ILEI, do en la elektronika aŭ papera aliĝilo bonvolu noti, kiun lingvon Vi emus prezenti kaj kiujn ilojn Vi bezonas. Al la LF ne necesas aliĝi, se Vi volas nur spekti ĝin.

Kiel kontakti organizantojn? Vi estas bonvena skribi al Dennis Keefe, Organizanto de la ILEI Lingva Festivalo aŭ Aida Ĉiĝikaitè, Organizanto de ILEI Konferenco

NE PERDU ŜANCON PREZENTI VIAN IDENTECON AL VASTA MONDO!

Kia estos la festivalo ĉijare? Dependas de Vi — venu, partoprenu, ĝuu, spektu, inteŝanĝu spertojn, akiru sciojn pri fremdaj lingvoj, donacu peceton de via kulturo al aliaj kaj — tre gravas — montru veran utilon de Esperanto al neesperantistoj, eĉ se ili nur hazarde aperos en la festivalo.

Laŭeble ni vidos filmitan materialon kaj fotojn de la antaŭaj Lingvaj Festivaloj. Ĉiu prezentanto havos 25 minutojn ĉe speciale aranĝita stando kaj rajtos prezenti sian lingvon laŭ sia bontrovo. Eblas tute simple prezenti, paroli pri historio, gramatiko, geografia regiono aŭ ligita kulturo, aŭ veni vestita per naciaj vestaĵoj, kunporti naciajn manĝojn, aŭskultigi nacian muzikon, naciajn dancojn k. t. p. Kutime estas prezentataj, depende de la tuta nombro, 4-5 lingvoj samtempe, kaj sekvas 3-4 paralelaj duonhoraj prezentadoj. Dum niaj konferencoj ni uzas 25 minutojn por prezenti ĉiun lingvon, sed ankaŭ ekzistas festivaloj kun ekzemple 1-horaj prezentoj. Ebla strukturo de la prezento povas esti ekzemple (ne nepre!):

1. Historio de la lingvo — 3 min.
2. Nuna geografia regiono de uzado de la lingvo — 2min.
3. Prezento de ĉefaj gramatikaĵoj de la lingvo — 5min.
4. Ekzemploj de tipaj esprimoj, salutvortoj k. t. p. — 7 min.

5. Nacia kulturo, ligita kun la lingvo — 8 min.

6. Ekzemploj de sonanta lingvo — 5 min.

Principe ne ekzistas ununura maniero por tia prezento, iu preferas esti pli serioza, iu prezentas en sia duonhoro kvazaŭ komedion. Komence de la konferenco okazos kunveno, dum kiu ni ankoraŭ pli detale klarigos, kiel prepari prezentadon de lingvoj, do ne timu proponi vin mem!

Vizitu ankau retpaĝon de la Lingva Festivalo en Krakovo

www.linguafest.info/krakow/hejmo.htm

Pri la ILEI/UEA-ekzamenoj:

Oni atentigas pri la rekomendo de la Estraro de UEA, ke la delegitoj „atingu almenaŭ la nivelon de meza ekzameno“. Simile, laŭ la regularo pri nova ILEI/UEA-ekzameno pri instrukapablo, „kandidatoj devas posedi Esperanton minimume ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA“. Estraro de ILEI aparte atentigas ĉiujn instruistojn, instruantojn kaj instruontojn, ankaŭ membrojn de ILEI, ke ili atingu almenaŭ ĝis la nivelo de la meza ekzameno de ILEI/UEA. Se Vi planas fari ekzamenon de meza nivelo dum UK, ni havas al Vi ankoraŭ unu proponon: tuj antaŭ ĝi venu al ILEI-konferenco por fari la elementnivelan ekzamenon kaj ĝuu interŝanĝon de spertoj kun samideanoj el pluraj landoj. Se Vi ne kuraĝas fari ekzamenon dum UK — venu por fari ĝin dum ILEI-konferenco. Kial? Ĉar apude, dum la tuta semajno, Vi havos diverslandajn instruistojn kaj instruantojn al kiuj ĉiam eblas driketi Viajn demandojn, ĉiam kun ili Vi povos konsultiĝi pri diversaj gramatikeroj kaj lingvouzo. Eĉ lerni tion, kion Vi ne sukcesis imagi kaj multe plibonigi sian lingvonivelon por nepre sukcesi dum la ekzameno. Dum la konferenco en Krakovo okazos la Internaciaj Ekzamenoj pri Esperanto je elementa kaj meza niveloj. La ekzamenoj konsistas el tri partoj: gramatika testo, skriba parto kaj parola parto. Nur sukcesintoj en la gramatika testo rajtas partopreni la skriban parton de la ekzameno kaj, atinginte en tiu skriba parto la sukceslimon de 60 poentoj, la parolan parton. Pro praktikaj kialoj anticipa sinanonco estas konsilinda. Anoncu Vin prefere antaŭ la 15a de julio 2009 ĉe la prezidanto de ekzamena komisiono dum la konferenco en Krakovo Jennifer Bishop (Jenny.Bishop@Education.monash.edu.au), ĉefa loka organizanto Malgosia Komarnicka (margareta.ilei.pollando@gmail.com) aŭ kasisto de ILEI Sjoer Bosga (sjoerd@esperanto.se) kaj samtempe pagu la ekzamenkotizon (60 % de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato) al UEA konto ilek-a. Kaze de neprezentigo aŭ ne sukceso en la testo, oni ricevos 50 % de la pagita kotizo. Eblas sin anonci ankaŭ dum registrado veninte al la konferenco. Tiam la ekzamenkotizo estos 70 % de la MA-kotizo en la loĝlando de la kandidato. Detalaj informoj pri la ekzamenoj, inkluzive de specimenaj testoj, troviĝas ankaŭ ĉe www.edukado.net/ekzilei.jsp

NE PERDU EBLECON KONVINKIĜI KIOM BONE VI UZAS LA LINGVON!

Aliĝilo:

Konferenca urbo:

La iama pola ĉefurbo allogas per unika historia medio pro kiu ĝi listiĝas en la Monda Heredaĵo de Unesko. Ankaŭ el movada vidpunkto Krakovo estas konata urbo. Eble ne nur ĉar tie estas la sidejo de nia pola sekcio kaj lernejo sub nia aŭspicio, sed ankaŭ pro tio ke ĝi gastigis Universalan Kongreson de Esperanto en 1912 kaj 1931, la plej grandan Internacian Junularan Kongreson de TEJO, en 1987, kaj jam de 25 jaroj la aranĝon „Esperantaj Tagoj de Krakovo“, organizita de la Krakova Societo Esperanto. En 2008 en Krakovo okazis la 16-a IMEK (Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso).

Jam en 1364 ĝi iĝis universitata urbo, tradicio kiu daŭras ĝis nun — Krakovo havas ne malpli ol 23 altlernejoj kaj univesitatoj! Etoso de studenta urbo kuniĝas kun serioza universitata vivo de unu flanko, kaj multflanka turismo de la alia. La provinco Małopolska, de kiu ĝi estas la ĉefurbo, estas ne malpli varia kaj alloga — de la belega naturo kaj vintraj sportejoj de la montaro apud Zakopane ĝis lokoj kun profunda historia signifo. Tra ĝi fluas rivero Vistulo, ĉe kies bordo oni trovas faman kastelon Wavel. Kaj ĉio nur je nur kelkaj horoj en trajno disde la UK-urbo 2009!

Krakovo estas la plej fama urbo de Pollando kaj unu el la plej gravaj kulturaj urboj de meza Eŭropo. Ĝi estas situata en la sudo de Pollando en supra fluo de Vistulo.

Ĝis la jaro 1609 Karkovo estis ĉefurbo de Pollando kaj nuntempe estas la ĉefurbo de provinco Małopolska.

La koro de la urbo estas la urbocentro, la plej granda mezepoka placo de Eŭropo. Samkiel antaŭ jarcentoj, en ĉi tiu loko koncentriĝas kultura, komerca kaj socia vivo de Krakovo. Ĝi estas ŝatata loko por pentristoj, muzikistoj kaj kolomboj. Preskaŭ en ĉiuj antikvaj brik- kaj ŝtondomoj estas kafejoj, restoracioj, galerioj, muzeoj kaj vendejoj. La urbocentro de la urbo estas listigita en la Monda Heredaĵo de Unesko.

Meze de la Ĉefpaco staras la antikva flava Draphalo, en kiu same kiel en la 13-a jarcento ekzistas butikoj kun memoraĵoj: popolaj artvejoj kaj sukkena juvelaro. Sur la etaĝo de Draphalo troviĝas galerio de la pola pentroarto de la 19-a jc., nuntempe ĝi estas translokitita al la reĝa kastelo en Niepołomice.

La plej granda konstruaĵo de la Ĉefplaco estas Sankta-Maria Preĝejo. La okcidenta flanko de la preĝeja turo estis la urba gardoturo. Dum ĉiu plena horo de ĝiaj fenestroj fluas trumpetsignalo, la muzika simbolo de Krakovo. En la preĝejo, en la ĉefaltarejo troviĝas fama, skulptita el tilia ligno, kolorigita kaj orumita altaro de Vito Stvosio.

Wavel, la reĝa kastelo, estas la plej grava monumento de la krakova historio. Ĝi situas sur la monteto apud Wisła (Vistulo). Tie troviĝas la plej granda kaj la plej valora kolekto de centkelkdek antikvaj gobelinoj. Wavel estas listigita en la Monda Heredaĵo de Unesko.

La Jagelona Universitato, komence La Krakova Akademio estis fondita en la jaro 1364 de la reĝo Kazimiro la Granda

La Teatro al Julio Słowacki estas la plej okulfrapa konstruaĵo ĉe Szpitalna strato. La teatran konstruaĵon oni konstruis en la jaroj 1891-93, en la stilo de pariza Opero.

Pli malnova kaj pli nova centroj de Krakovo ofertas neripeteblan etoson de la ĉiutaga vivo. Amaso da homoj ripozas, interparolas aŭskultante muzikon en kafejoj, bierejoj, restoracioj aŭ vizitas filharmonion, muzeojn, galeriojn, teatrojn, kabaredojn. Sur la Ĉefplaco ne mankas florvendistinoj, kiuj en provizitaj standoj vendas florojn de ĉiu koloro. Multaj doroŝkoj* ĉevala tramo aŭ meleksoj** veturigas vizitantojn al belaj kaj interesaj lokoj. Ofte sur la Ĉefplaco okazas diversaj urbaj solenaĵoj kaj festivaloj. Tie aperas budoj kaj bazarstandoj. Ŝatantoj de naturo povos viziti botanikan ĝardenon, Plantarion, kelkajn parkojn aŭ admiri abunde ornamitajn apudkafejajn ĝardenetojn.

En Krakovo estas ankoraŭ unu fascina loko, Kazimierz, la juda kvartalo de Krakovo el la 14-a jarcento. Kazimierz estas la dua en la mondo tiel granda kaj valora juda komplekso de antikvaj monumentoj. Ĉi tie estas sinagogoj (inter kiuj la plej malnova el la 15-a jarcento), malgrandaj dometoj kaj juda tombejo.

Krakovo estas urbo por ĉiuj. Por ĉies aĝo kaj plaĉo ĝi posedas konvenajn allogojn. Valoras profiti ilin por kontentigi menson kaj sentojn.

* doroŝko - malpeza urba chevala veturilo, aperinta meze de la 19-a jarcento. Nuntempe turisma atrakcio.

** melekso - elektra senpolua automobilsimila veturilo por urba trafiko.

Utilaj informoj:

- Mapoj de Krakovo por la ILEI-konferencanoj:

http://ilei.info/konferenco/Mapoj_Krakovo.pdf

- Vetero en Krakovo

La averaĝa temperaturo en Krakovo en julio estas 23 celsiaj gradoj. Kunporti jaketon por la plej freŝaj noktoj konsilindas.

- Elektra kurento

Elektra tensio en Pollando estas 220 V, 50 Hz, kiel en preskaŭ tuta Eŭropo. Ankaŭ la kontaktingoj estas la kutimaj eŭropaj. Tamen se por Viaj teknikaĵoj Vi uzas alitipajn kotalitojn konsilindas kunporti adaptilojn.

- Manĝo kaj akvo

Eblas antaŭmendi plene pension (matenmanĝo /tagmanĝo /vespermanĝo) je la prezo de 15 € tage, kion ni nepre rekomendas, ĉar aliloke la kostoj estos multe pli altaj kaj apude ne troviĝas aliaj kafejoj aŭ restoracioj. Tiuj, kiuj ne mendis estos priservataj nur post foriro de tuta grupo.

Trinkeblas akvo rekte de la urba akvedukto, kaj krome, tie kaj ĉi tie en la konferencejo estas trinkakva instalaĵo. Se vi ŝatas mineralan akvon, vi povas aĉeti unu botelon da akvo 0,5 l kontraŭ pli malpli

- Retaliro

Senpaga retaliro disponeblas en hoteloj Za Kolumnami, Krakowiak kaj Żaczek, sed ne en gastejo Oleandry. En konferencejo funkcias WiFi retaliro.

- Kopiado

En hotelo Za Kolumnami estas eblo fari kopiojn kontraŭ 10 groŝoj por paĝo.

- Valuto kaj monŝanĝo

En Pollando oni uzas **zlotojn** (Zł, internacia kodo — PLN). 1 Zł egalas al 100 groŝoj. Nuna kurzo estas 1 EUR ~ 3,7 PLN. Plej konsilindas preni monon de monaŭtomatoj, kiuj facile troveblas ĉie. Internacie konverteblajn valutojn eblas ŝanĝi en bankoj, monŝanĝejo, grandaj hoteloj. Bonvolu ne ŝanĝi monon en neoficialaj monŝanĝejoj.

- Sanservoj

Medicinaj servoj de pluraj landoj havas kontraktojn kun Pollando, surbaze de kiuj eksterlandanoj povas uzi la samajn servojn kiel enlandaj loĝantoj. Bonvolu mem kontroli, ĉu via lando havas tian kontrakton kaj sub kiuj kondiĉoj. Via aliĝo al la konferenco inkluzivas nenium asekuron — bonvolu mem prizorgi asekurpolison.

- Poŝtaj tarifoj

Leteroj kaj bildkartoj (ĝis 50 gramoj)

Pollando: 1,55 zloty

Eŭropo (inkl. Cipro, Izraelo kaj Ruslando): 2,40 zloty

Aliaj kontinentoj: 2,50 zloty

- Vizoj

Civitanoj de jenaj landoj ne bezonas vizon por eniri Pollandon: Andoro, Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Brunejo, Bulgario, Cipro, Ĉeĥio, Ĉilio, Danujo, Estonio, Finnlando, Franco, Germanio, Grekujo, Gvatemalo, Hispanio, Honduro, Honkongo, Hungario, Irlando, Islando, Italio, Izraelo, Japanio, Kanado, Kostariko, Kroatio, Latvio, Liĥtenŝtejno, Litovio, Luksemburgo, Makao, Malajzio, Malto, Meksiko, Monako, Nederlando, Nikaragvo, Norvegio, Nov-Zelando, Panamo, Paragvajo, Portugalio, Rumanio, Salvadoro, Sanmarino, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Koreio, Svedio, Svislando, Unuiĝinta Reĝlando, Urugvajo, Usono, Vatikano, Venezuelo.

Detalaj informoj pri polaj vizoj oni povas trovi en la paĝo de Pola Ministerio pri Eksteraj Aferoj: <http://www.msz.gov.pl/Visa.requirements.2346.html>

Por invitiloj bonvolu turni Vin al Magdalena Tatara, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, <mtatara@gmail.com>, tel. + 48 665 310 609.

- Ambassadejoj en Krakovo

Aŭstrio

31-123 Kraków ul. Krupnicza 42

tel. (0-12) 421-99-00

fax (0-12) 421-67-37

Danio

31-008 Kraków

ul. św. Anny 5

tel. (0-12) 421-73-80

fax (0-12) 421-72-91

Francio

31-043 Kraków

ul. Stolarska 15

tel. (0-12) 424-53-00

fax (0-12) 424-53-20

Germanio

31-043 Kraków

ul. Stolarska 7

tel. (0-12) 424-30-00

fax (0-12) 424-30-10

Hungario

31-012 Kraków
ul. św. Marka 7/9
tel. (0-12) 422-56-79
fax (0-12) 422-47-84

Ruslando

31-144 Kraków
ul. Biskupia 7
tel. (0-12) 422-26-47
fax (0-12) 422-90-66

Slovakio

31-027 Kraków
ul. św. Tomasza 34
tel. (0-12) 425-49-70
fax (0-12) 425-49-72

Ukrainio

al. Beliny-Prazmowskiego 4
31-514 Krakow
tel. (0-12) 429-60-66
fax (0-12) 429-29-36

Usono

31-043 Kraków
ul. Stolarska 9
tel. (0-12) 424-51-00
fax (0-12) 424-51-03

Bonvolu informiĝi ankaŭ en <http://www.msz.gov.pl/Foreign.Embassies.in.Poland.2144.html> angle aŭ pole <http://www.msz.gov.pl/Przedstawicielstwa.dyplomatyczne.w.Polsce.12916.html>

- Telefonado

Eblas uzi publikan telefonan servon en la hotelo. Uzeblas kaj kartoĵoj, kaj moneroj. La kartoĵojn eblas aĉeti en la ĉiu kiosko, vendejo. Telefonkodo de Pollando estas +048 , por Krakovo estas 012.

- Medikamentoj

Se vi uzas preskribitajn medikamentojn, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina. Konsilindas ankaŭ havi recepton de la kuracisto, se Vi portas medikamentojn tra landlimoj.

- Sekureco

Krakovo kaj aliaj urboj de Pollando estas sekuraj, sufiĉas ke oni konduku laŭ principoj de sekureco same, kiel en plejmulto de turismaj lokoj.

Alveno/foriro:

Krakovo estas facile atingebla per komfortaj naciaj kaj internaciaj trajnoj kaj busoj. Ankaŭ estas flughaveno (Krakovo-Balice, flughaveno „Johano Paŭlo la Dua“) kun multaj malmultekostaj flugoj.

Ne malproksime estas ankaŭ flughaveno de Katowice, kaj de Varsovia flughaveno eblas atingi Krakovon per buso kaj trajno en 4-5 horoj.

ILEI vin akceptos ekde la 17a de julio — unua manĝo estos la 17an de julio vespere. La lasta manĝo estos la matenmanĝo de la 25a de julio, post kiu ILEI proponas komunan vojaĝon al la Universala Kongreso de Esperanto, en Bjalistoko.

Konferenceto:

La ĉefa konferenceto estas la *La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo (WSZiB)* en Krakovo, ĉe la strato Armii Krajowej 8. Ĝi estas facile atingebla de la stacidomo aŭ urbocentro pere de rektaj tramoj kaj busoj, kaj ofertas al ni grandajn kaj luksajn salonojn. Estas lifto. La konferenceto situas en akademia hotela centro 5 min. piede de ĉefa hotelo por partoprenantoj de la konferenco kaj 2,5 km de malnova urbo kaj ĉefa placo de la urbocentro. Legu pli ĉe: www.wszib.edu.pl

Tranoktejoj:

Ĉiuj, kiuj venos antaŭ la konferenco, t. e. la 16an de julio (aŭ pli frue) povos ekloĝi en elektita hotelo (sen matenmanĝo), se iu volas resti en la hotelo pli longe — tio aranĝeblas, nur bv. informi prezidanton de LKK Malgoŝia Komarnicka (margareta.ilei.pollando@gmail.com) kaj la kasiston Sjoerd Bosga (sjoerd@esperanto.se).

• ZA KOLUMNAMI

Ni proponas 1-litan hotelĉambron kontraŭ 34 € kaj 2-litan kontraŭ 25 € por persono. En hotelaj ĉambroj estas fridujo, akvoboligilo, televidilo kaj senpaga retaliro.

Ni proponas ankaŭ malpli kostajn studentajn ĉambrojn, same kun retaliro kaj fridujo. Ne estas kuirejo, sed eblas pruntepreni akvoboligilon. 1-lita studentĉambro kostas 22 €, loko en 2-lita 16 €.

Estas lifto. (strato Armii Krakowej 9).

• KRAKOWIAK

Ni proponas 1-litan hotelĉambron kontraŭ 34 € kaj 2-litan kontraŭ 25 € por persono. En hotelaj ĉambroj estas fridujo, akvoboligilo, televidilo kaj senpaga retaliro. Estas lifto. (strato Armii Krajowej 9a — manĝejo en la sama konstruaĵo).

• ŻACZEK

Iom pli malmultekosta, sed je 2.7 km de la konferenceto (estas busoj kaj tramoj). En hotelaj ĉambroj estas fridujo, akvoboligilo, televidilo kaj senpaga retaliro. Ni proponas 1-litan hotelĉambron kontraŭ 24 € kaj liton en 2-lita hotelĉambro kontraŭ 18 €. Estas lifto.

Estas ankaŭ 3-litaj studentaj ĉambroj, kun duŝejoj kaj kuirejoj en koridoro. Ankaŭ tie estas senpaga retaliro. Loko en 3-lita studentĉambro kostos 12 €. Estas lifto. (strato al. 3 Maja 5)

• OLEANDRY

En ĝi ni proponas lokojn en 3-4 litaj ĉambroj (9 €) aŭ 6-8 litaj ĉambroj (7 €). En ĝi estas nek lifto, nek retaliro, nek bantukoj. Eblas lui litotukojn kontraŭ 4 zlotoj por semajno aŭ kunporti proprajn. Estas kuirejo, necesejoj kaj duŝejoj en koridoro. (strato Oleandry 4 — apud hotelo Żaczek, en la sama konstruaĵo troviĝas salono por vespera programo).

• CRACOWIA

Fama kaj luksa hotelo. Ni proponas 1-litan ĉambron kontraŭ 124 € aŭ lokon en 2-lita ĉambro kontraŭ 83 €. Vi povos matenmanĝi (aparte mendinda) ĉu en la hotelo, ĉu kun aliaj konferencanoj en restoracio apud la konferenceto. Estas lifto. (strato Al. F. Focha 1).

Manĝoj:

Eblas mendi plenan pension por via tuta restado (matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo) kontraŭ 15 € tage. En tagoj kiam estos organizitaj malpli ol tri manĝoj (alventago, forirtago, ekskursita tago, tago kiam okazos bankedo vi pagos rabatitan sumon proporcia al kvanto de manĝoj. Manĝoj okazos konvene proksime al la konferencejo aŭ ejo kie okazos vespera programo. Dum tuttagaj ekskursoj tagmanĝo kaj vespermanĝo estas inkluzivitaj en la ekskursita prezo. Marde, se vi ne aliĝas al la ekskurso al Zakopane, vi tagmeze kaj vespere memzorgu!

Bankedo: Komuna vespermanĝo en kafefo „U Literatów“ en urbocentro kostos 30 € por A-landanoj, 17 € por B-landanoj (merkrede).

Kafopaŭzoj estas unu el ĉefaj eroj de ĉiuj renkontiĝoj por starigi personajn kontaktojn. ILEI provizos per kafo, teo, cukero kaj iom da dolĉaĵoj, tamen Vi ĉiuj estas petataj kontribui al la paŭzoj per pli da dolĉaĵoj, ĉu kunportitaj de Viaj landoj, ĉu surloke aĉetitaj. En la sama salono *L. Belmont* funkcios eventuale ankaŭ libroservo, iu ekspozicio.

Ekscuroj kaj vojaĝo al UK

TT1 Zakopane (marde, 45 €)

estas nomata la „vintra ĉefurbo“ de Pollando. Programo de la ekskurso: montpromenado, veturado per kablofervojo, perkaleŝa promenveturo, torĉoj, montara muziko, varmiga vino, dancado kaj aliaj allogaĵoj (inkl. tag- kaj vespermanĝoj).

TT2 Wadowice*, Kalwaria, Oświęcim (Auschwitz) (ĵaŭde, 45 €)

ni unue konatiĝos kun Wadowice, naskiĝvilaĝo de papo Johano Paŭlo la Dua kaj Kalwaria. Poste ni atingos Oświęcim (Auschwitz) la plej granda nazisma koncentreja komplekso, simbolo de holkaŭsto. La tereno de tiu eksa koncentrejo nun servas kiel memoriga muzeo. Ni vidos dokumentan filmon, la muron de morto, gasĉambron kaj krematorion, punlaborejon. Ĝi apartenas al la UNESKO-listo de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj (inkl. tag- kaj vespermanĝoj).

*Vidu ĉe: http://www.ilei.info/konferenco/Alvoko_Krakovo_5.jpg

DT1 piede tra Krakovo (dimanĉe, 5 €)

En unua duontaga ekskurso ni estos gvidataj perpiede tra Krakovo: promenado laŭ la reĝa vojo, trarigardo de la Malnova Urbo (la barbakano, la preĝejo de Sankta Maria, la draphaloj, la urboplaco, la Collegium Maius, la domo de la papo Johano Paŭlo la Dua, la strato Kanonicza, la reĝa kastelo kaj la katedralo sur la monteto Vavelo.

DT2 salminejo Wieliczka* (lunde, 19 €)

Ĝi situas proksime de Krakovo kaj estas unika loko enskribita en la UNESKO-liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj. Laŭ legendo, salon oni malkovris dank' al Sankta Kinga, antaŭ jarcentoj. Multaj ĉambregoj, subteraj lagoj, preĝejoj, koncertejoj, bankedejoj, vendejoj, manĝejoj, eĉ sanigejo allogas turistojn de la tuta mondo.

* Vidu ĉe: http://www.ilei.info/konferenco/Alvoko_Krakovo_3.pdf

DT3 Niepołomice (merkrede, 12 €)

Ĝi situas je 25 km sudoriente de Krakovo kaj havas riĉan historion kaj interesajn vidindaĵojn: reĝan kastelon, preĝejon kaj praarbaron. La historio de la urbo komenciĝis en la tempo de la formiĝo de la Pola Ŝtato. La grandioze rekonstruita kastelo iĝis la dua reĝa sidejo post Vavelo.

Al UK — komuna trajnvojaĝo (sabate, 20 €)

Ni forveturos tuj post matenmanĝo je la 10:10 de ĉefa stacidomo (Główny) per rekta trajno kaj venos al Bjalistoko je la 17:55, do ni esperas ankoraŭ sukcesi registriĝi al UK kaj partopreni Movadan Foiron. Ni mendis vagonon de 2a klaso. Por ne enui survoje estas antaŭvidata surprizo!

Aliĝkotizo:

La baza aliĝkotizo dependas de la aliĝdato kaj de la lando de la aliĝanto. Por helpi al la organizantoj eviti erarojn, bonvolu aliĝi al la konferenco pere de la reta aliĝilo je <http://ilei.info/konferenco/alighilo2009.php> tiel vi mem plene respondecos pri ĝusteco de viaj datumoj. La reta aliĝilo por vi kalkulos la plenan aliĝkotizon. Se vi ne havas retaliron, vi povas uzi paperan aliĝilon — tiukaze ni sendos al vi fakturon laŭ kiu vi pagu. Kiel aliĝdato en ajna kazo validas la **dato de alveno de via pago** ĉe ILEI. **Aliĝilo sen kompleta pago ne estos valida.**

Aliĝperiodo	Ĝis 31.03.09	ĝis 30.06.09	post 30.06.09
Aliĝkategorio	A / B	A / B	A / B
Membro de ILEI*	50 € / 30	€ 60 € / 36€	70 € / 42 €
Ne-membro de ILEI	63 € / 38 €	75 € / 44 €	88 € / 53 €
Junulo**, handikapulo***	25 € / 15 €	30 € / 18 €	35 € / 21 €

Estas du **landokategorioj**:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.) kaj Latinameriko.

* **Membro** estas tiu kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco.

** **Junulo** estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post 31-a de decembro 1978.

*** Bonvolu sendi al ILEI **atestilon**.

Aliĝkotizo **por unu tago** estas 25 € por A kaj B landoj.

Kiel pagi?

Sendepende de via pagmaniero, bonvolu tuj, kiam vi faras vian pagon, informi la kasiston.

Vi povas pagi jene:

- Al ILEI-konto ĉe UEA
prefere pagu per t.n. EU-pago al la konto de ILEI en Svedio: ILEI, IBAN: SE56 8000 0832 7999 4515 0143, BIC/SWIFT: SWEDSESS. Aldonu 6 € por svedaj bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio. El Svedio eblas pagi al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank;
- El Eŭropa Unio
ilek-a, indikante: „ILEI-konferenco 2009“, nur ĝis la 15-a de majo 2009;
- Ene de Pollando
nur por poloj, al la konto de la Pola Sekcio de ILEI, 82 1940 1076 3059 0661 0000 0000, LUKAS Bank Kraków, ul. Królewska 94. Bonvolu kontakti la sekcian kasiston: Magdalena Tatara, Kozmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, <mtatara@gmail.com>, tel. + 48 665 310609.

Kondiĉoj pri pagoj kaj repagoj

La aliĝkotizo ne inkluzivas ajnan asekuron, loĝadon, manĝojn, ekskursojn kaj aliajn eventualajn aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en IPR aŭ/kaj en la retpaĝaro de ILEI. Por mendoj validas la prezoj menciitaj en tiu ĉi aŭ postaj informiloj, aŭ ILEI-retpaĝoj.

Por mendoj atingantaj nin post la 20a de aprilo 2009 aliĝanto devas aldone pagi 10 % de la sumo por la mendataj servoj. Post la 15a de majo ni ne plu povas al vi garantii mendon de tranoktejon.

50 % de la aliĝkotizo kaj 80 % de la sumo por mendoj estas repagota se aliĝinto malaliĝas pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio 2009. Malaliĝinte pro valida kaŭzo antaŭ la 1-a de julio 2009, aliĝinto ricevos 60 % de la sumo por mendoj, sed ne la aliĝkotizon. Malaliĝinte pli poste, aliĝinto ne ricevos ajnan repagon.

Kaze de ne-okazigo de ekskurso (ekz. pro ne sufiĉa kvanto de aliĝantoj), pagita sumo por koncerna eskurso estas repagota.

Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi diferencon depende de lando kaj aliĝperiodo. ILEI ne repagas diferencon kaze de transdono al aliĝanto en malpli kosta kategorio.

Subtenu aliajn

Kiel kutime, ankaŭ ĉi jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al Koleghelpa Fonduso (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al Fonduso Dazzini (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al konferenca kaso, k. t. p. Ankaŭ indas subteni la organizadon de nova seminario en Afriko, planata por julio 2009 en Kinŝaso.

Ekstrakto el konferenca regularo:

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco.

7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konf-oj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

Plie legeblas: http://www.ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf

Kontaktoj

Bonvolu neniam skribi al la konferencejo!

Vi ĉiam estas bonvena skribi al: Małgosia J. Komarnicka margareta.ilei.pollando@gmail.com — ĉefa loka organizanto, Radojica Petrović rade@ikso.net — prezidanto de ILEI, Sjoerd Bosga sjoerd@esperanto.se — kasisto de ILEI.

BONVENON AL LA ILEI-KONFERENCO DUM

KIU VI FARTOS PLI BONE, ESTOS PLI FORTA

KAJ PLI FELIĈA SPITE AL LA KRIZO!